
esk
Lumo
KEA
Oktobro 2026
Kiu Estas...?
Normando Fleury
La halifaksa klubo daŭras...
Amikeme
Sekvante la historiajn spurojn de
franclingvanoj en Usono
La propra Odiseado de Abel Montagut:
Kiel traduki Homeron al Esperanto

Lumo estas la oficiala Esperanta revuo de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj Esperanto-Societo Kebekia (ESK), kiuj antaŭenigas Esperanton en Kanado.

Sekvu la lastajn novaĵojn de Esperanto Kanado

Kanada Esperanto-Asocio
Estraranoj:
Geoffrey Greatrex (Prezidanto)
Bob Williamson (Sekretario)
Garry Evans
Andrew (Andreo) Sly
Luis Obando
Trefleo Mercier
Jordan Zero
Ĵenja Amis
John Huang

Esperanto-Societo Kebekia
Estraranoj:
Normand Fleury (Prezidanto)
Sylvain Auclair (Sekretario)
Rafael Scapin
Garry Evans
Ĵenja Amis
Zdravka Metz

Redaktoroj: Garry Evans, Luis Obando
Dezajno: Daniela Obando
Enpaĝigo: Daniela Obando, Luis Obando, Viviana Castro
Provlegantoj: Bob Williamson, Francisko Lorrain, Silvano Auclair, Trefleo Mercier
Fotoj: Diversaj
Artikoloj: Pluraj aŭtoroj
Patronaj membroj: Frank Meijer, Sheila Devlin

Lumo
Publikigite kvaronjare
Farite en:
Oktobro 2026

Enhavo

4 Intervjuoj. Kiu Estas...?
Normando Fleury: Botaniko, internacia amo kaj duonjarcento da organizado
10 Lokaj kluboj:
La halifaksa klubo daŭras...amikeme
12 Eventoj:
Raporteto pri la 111a UK en Graz/Graco.
14 Ĉe la Praula Fajro:
La Korvo kiu ŝtelis la lumon
16 Intervjuo kun Mario Périard
Sekvante la historiajn spurojn de franclingvanoj en Usono
18 Intervjuo kun Mario Périard (Franca)
Sur la piste de l'histoire des francophones aux États-Unis
20 Movado:
Leteroj pri la nova LUMO
21 Eventoj
Paralela Universo
24 Kulturo:
La propra Odiseado de Abel Montagut: Kiel traduki-Homeron al Esperanto
28 Recenzo:
" Kredu min, sinjorino!" - nekredeble leginda friponaĵo
29 Slam-poezio ĉiam vivanta!
30 Socio kaj Ekonomio
Unu lando, multaj komercaj baroj
31 Novaĵoj:
Jesper Jacobsen fariĝas la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto
32 El la Arĥivoj:
Honorigo de Kim Keeble
33 Statutŝanĝoj: Solvo aŭ distraĵo? Guy Matte
34 Anoncoj
35 Stipendioj por 2027

Letero de la **Redaktoroj**

Garry Evans kaj Luis Obando

La lastajn du numerojn de Lumo ni sendis al vi en presita formo. La reago de la legantoj estis unuvoĉe pozitiva. Ni intencas sendi Lumon en presita formo senpage al ĉiuj membroj de Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kun adreso en Kanado, kaj ankaŭ al membroj de la Esperanto-Societo Kebekia (ESK), kiuj petis ekzemplerojn, ĝis la fino de 2026.

Sed kion fari post tio? La kostoj de presado kaj sendado estas altaj. Ĉu ni sendu la revuon ankaŭ eksterlanden, kie la sendokostoj estas pli altaj? Kaj kiun formaton ni elektu — la grandan 24-paĝan formaton de aprilo aŭ la malpli grandan, 36-paĝan, formaton de julio?


La KEA estraro longe diskutis la aferon. La kerna faktoro estis, ke la malpli granda formato kostas multe malpli por presi kaj sendi. Tial ekde nun ni eldonos la revuon en tiu formato.

Ankaŭ la kotizon ni longe debatis. Ni volas, ke ĉiuj kanadaj esperantistoj povu ricevi la presitan Lumon. Do nia fina decido estas, ke (1) ĉiuj KEA-membroj, kaj (2) ESK-membroj tion petante, loĝantaj en Kanado, ricevos Lumon dum la tuta jaro sen aldona pago.

Tamen, por helpi pagi la kostojn de Lumo, la estraro decidis altigi la membrokotizon de KEA — antaŭe 25 $ por du jaroj — al 20 $ jare. Krome, ni enkondukas subtenan membrecon (50 $ jare) kaj patronan membrecon (100 $ jare) por tiuj, kiuj ŝatus subteni KEA. Membroj de KEA kiuj loĝas ekster Kanado kaj deziras ricevi la presitan version pagu nur la aldonan sendokoston.

Ĉu vi ŝatas

LUMON?



Ĉu vi volas verki artikolon por *LUMO*?

Jes, faru!

Tial ke ni publikigas 4 numerojn jare ni konstante akceptas novajn artikolojn. La artikolo bonvole estu konciza kaj tre interesa por kanadaj esperantistoj. Vi povas sendi al unu el niaj redaktoroj aŭ rekte per lumo@esperanto.ca


Ĉiuj aprobitaj artikoloj publikiĝos en nia retejo, kaj la plej bonaj aperos ankaŭ en la presita *Lumo*.

Kiu Estas...?

Normando Fleury:

Botaniko, internacia amo kaj duonjarcento da organizado

Intervjuita de Garry Evans



Mi volas demandi pri via fono: kie vi naskiĝis kaj kreskis, kiuj estis viaj gepatroj?

Mi naskiĝis en Granbeo en 1956 kaj vivis tie ĝis mi foriris studi hortikulturon en Otavo en 1977. Jam kiel junulo mi tre interesiĝis pri naturo, birdoj kaj plantoj. Granbeo estis ideala loko por tio, kun montoj, marĉo, lago, rivero kaj arbaroj.

Krom Esperanto, via granda ŝatokupo estas birdumado. Ĉu estis ekde la infanaĝo, ke vi ekinteresiĝis?

Jes, ekde kiam mi estis 15-, 16-jara. Mi interesiĝis semajnfine iri kun amikoj kaj observi birdojn. Tuj kiam ni laboris somere, la celo estis gajni iom da mono por aĉeti binoklon aŭ birdan libron. Mi daŭre havas mian unuan, kiu nomiĝas *Peterson, Birds of Eastern America*. La libro estis nur en la angla.

Ĉu estis pro via amo al la naturo, ke vi decidis studi hortikulturon? Kaj ne en Montrealo?

Jes. Tiam fakte en Saint-Hyacinthe estis faka lernejo pri agrikulturo. Sed la nombro da personoj, kiuj povis studi en Saint-Hyacinthe, estis tre limigita. Pro tio mi iris studi en Otavo. La kurso estis parte en la franca, kaj ne tiom da franc-ontarianoj aliĝis. Mi fakte interesiĝis pli pri sovaĝaj plantoj. Tiam ne estis multaj kursoj por fariĝi ekologiisto.

Ĉu vi intencis fariĝi agrikulturisto aŭ bienisto?

Eĉ ne. Tuj post tiuj studoj, mi estis bonŝanca. La Ministerio pri Agrikulturo venis al nia kolegio kaj anoncis, ke por studentoj, kiuj volas iri plu perfektiĝi en Eŭropo, estis ebleco de interŝanĝoj. Kanado interŝanĝis tiam junajn fakulojn kun Francio, Nederlando, Britio kaj aliaj landoj en Eŭropo. Mi akceptis iri al Francio por plena jaro, de aŭgusto 1979 ĝis aŭgusto 1980.

Mi alvenis en nordan Francion por ses monatoj en Angers, en la Luara Valo, kaj poste pasigis ses monatojn en Toulon ĉe la Mediteranea marbordo. Tie mi laboris en vitrodomoj, produktante florojn. Mi tre interesiĝis plu resti en Eŭropo, kaj iu franca organizo, kiu peris laborlokojn, sendis min al Norvegio por labori dum kvin monatoj, kaj poste al Italio por ses monatoj.

Ĉu estis en Eŭropo, ke vi eklernis Esperanton?

Mi malkovris Esperanton en Angers. Mi loĝis en loĝejo por junaj laboristoj. Ili organizis aktivecojn. Do vi povis teatrumi, kanti en koruso... kaj estis kursoj pri Esperanto. Tio estis tuj apud la kastelo



Kun amikoj kaj edzino Zdravka Metz dum banketo de UK 2022 en Montrealo

Grésillon. Do estis multaj esperantistoj en Angers kaj apude.

Mi komencis lerni kun sinjoro Frangel en 1979. Sed kiam mi translokiĝis en decembro al suda Francio, mi ne povis plu studi, ĉar ne estis kursoj. Sed mi estis apud Toulon, kie estis grupo, kiu nomiĝas La Naturamikoj, en kiu estis esperantistoj. Mi amikiĝis kun ili, kaj semajnfine mi povis iri migri en la montoj, ekskursi kun ili kaj praktiki Esperanton.

Kiuj estis viaj unuaj agadoj en Esperantujo?

Somere de 1980, mi jam lernis sufiĉe, sed ne tiom bone, Esperanton. Mia laboro en Norvegio estis nur ekde septembro. Do mi iris al la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK). Mi iris trajne de suda Francio ĝis Finnlando por iri al Raŭmo — tiu fama kongreso! Kaj al la Universala Kongreso (UK) tuj poste, do por mi estis perfekte.

Por mi IJK estis mirinda sperto. Imagu: vi ĵus lernis novan lingvon, kaj vi estas kun 300 junuloj, eĉ el Rusio. Rusio, mi pensas, unuafoje permesis al junuloj iri al IJK. Kaj tiam mi miris: mi parolas nun kun ruso! Ĉar por ni kanadanoj, rusoj estis kvazaŭ malamikoj en tiu epoko, danĝeraj. Sed tiuj estis tre simpatiaj. Mi eĉ longe korespondis kun unu poste.

Kaj en tiu kongreso vi renkontis Zdravka-n (vian nunan edzinon)?

Jes, ni ne tuj enamiĝis. Estis multaj interesaj homoj tie. Por mi ĉio estis nova kaj interesa, ĉu ne? Mi eĉ nun havas amikecojn, imagu, de la jaro 1980, kun junuloj, kiujn mi renkontis tie. Nekredeble, ke vi povas havi tiom longan amikecon pere de Esperanto.

Kiam vi kaj Zdravka geedziĝis?

Multe pli poste. Post la IJK, mi iris al UK en Stokholmo. Kaj por mi tiu sperto estis malsama. Ĉar mi konis neniun, kaj mi estis junulo. Mi sentis min perdita en tiu UK.

Poste mi iris labori en Norvegio, kaj poste en norda Italio apud Udine kaj Trieste, do proksime al la jugoslava landlimo. Kaj tiel mi skribis al Zdravka,

ĉar ŝi korespondis kun mi ankaŭ kiam mi laboris en Norvegio. Tiam oni skribis leterojn, ĉu ne?

Ĉiaokaze mi skribis al Zdravka: “Mi frostas nun en norda Italio, ĉar mi loĝas sola en iu malnova domo apud la bieno. Ne estas hejtado, kaj nokte estas nur kelkaj gradoj ekstere.”

Ŝi diris: “Mi venos viziti vin.” Kaj ŝi venis kaj portis al mi lanajn ŝtrumpojn, lanan puloveron. Sed mi ne povis elteni tiun veran lanon, ĉar tiam estis vera lano el ŝafoj, kaj ĝi pikis mian haŭton. Kaj ŝi restis dum semajnfino.

Kaj poste ŝi invitis min: “Bona amikino mia edziniĝos. Ĉu vi ŝatus veni al tiu geedziĝo en Jugoslavio?”

Pro mia kanada pasporto, transiri la jugoslavan landlimon estis komplike, sed ni tamen regule vizitis unu la alian.

Kaj post Italio?

Nun estis 1981. Post mia laboro en Italio, ŝi demandis min: “Ĉu vi povus provi labori en Jugoslavio?” Jes, kial ne? Do mi decidis vivi kun Zdravka en Varaždin. La gepatroj loĝis supre, ni loĝis sube. Kaj ni geedziĝis la 15-an de aŭgusto 1981 —. Mi trovis iom da laboro en florbutiko, por fari floraranĝojn. Sed nur portempa laboro.

Do tiam vi decidis reveni al Kanado kun Zdravka?

Mia patrino invitis nin reveni. Ŝi diris: “Mi provizos laboron al vi ambaŭ.” Tiel, en 1982 ni revenis. Ni loĝis kun mia patrino, kiu havis novan kunulon, ĉar miaj gepatroj disiĝis. Estis en Saint-Michel-des-Saints, kelkajn horojn de Kebeko, ĉar ŝi aĉetis gastejon por fiŝkaptistoj dum la somero kaj ĉasistoj aŭtune. Ni purigis post la gastoj. Zdravka ordigis la litojn kaj helpis. Ni estis simplaj laboristoj.

Ĉar mia frato vivis en Montrealo tiam, ni decidis translokiĝi al Montrealo. Ankaŭ ĉar Zdravka gravediĝis. Sed ni perdis niajn unuajn du infanojn pro spontaneaj abortoj.

Devis esti malfacile por ŝi alkutimiĝi al la vivo en la okcidenta mondo, en



Dum bankedo UK 2022, Montrealo

la franclingva mondo. Ŝi ne parolis la francan, ĉu?

Zdravka parolis Esperanton, la kroatan kaj la germanan, ĉar tiam la germana estis tre grava lingvo tie, pro la proksimeco de Aŭstrio kaj Germanio. Sed ne la francan aŭ la anglan.

La patro de Zdravka parolis kun mi france, ĉar tiam oni lernis pli la francan ol la anglan. La patrino ne parolis la francan sed instruis la germanan.

Ĉiaokaze, estis multaj lingvoj, sed la sola komuna lingvo estis vere Esperanto. Sen Esperanto ni ne povis interkompreniĝi.

Kaj mi ĉiam estis interpretisto por mia patrino kaj la homoj ĉirkaŭe.

> "Oni devas agi, kaj tuj agi, pri la klimataj ŝanĝoj, kaj agi por protekti la biodiversecon."

Ĉu Zdravka rapide lernis la francan?

Kiam ni alvenis en Montrealo, ŝi enskribiĝis en kurso de la franca lingvo por enmigrantoj, kiun provizis la kebekia registaro. Tiel, kiam vi sekvas francan kurson dum ses monatoj, vi vere progresas. Ankaŭ en mia familio ŝi devis praktiki. Kaj ŝi gravediĝis, kaj alvenis Damir en novembro 1983 kaj Mira en julio 1985. Ni edukis niajn infanojn trilingve.

Ni aĉetis domon en Montrealo. Mia frato subtenis nin. Mi tuj dungiĝis en la botanika ĝardeno.

Labori en la botanika ĝardeno devis esti perfekta laboro por vi...

Perfekta! Kiam mi estis infano en elementa lernejo, en junio estis ekskursoj. Ni iris buse al la botanika ĝardeno kaj al la planetario. Kaj por mi, iri al Montrealo estis granda vojaĝo. Tra la ponto Jacques-Cartier! Kia aventuro! Kaj kiam mi iris al la botanika ĝardeno — mi tiom bone memoras — mi diris: "Mi ŝatus labori ĉi tie." Kaj mi sukcesis!

Kiam vi alvenis al Montrealo en 1982, vi tuj fondis la Esperanto-Societon Kebekian (ESK), ĉu?

— Kiam ni alvenis, imagu: ni estis du junaj esperantistoj, kiuj alvenis en Montrealon entuziasmaj. Kaj Wally du Temple aŭdas pri tio: "Jen internacia paro!" Kaj li diras al ni: "Ĉu vi ŝatus transpreni la oficejon de Kanada Esperanto-Asocio?"

Ni diris: "Jes, sed ni havas nur etan apartamenton."

"Ne gravas. Temas nur pri tajpilo ktp. Mi sendos al vi la meblojn." Ni havis nenion, ĉu ne? Kaj li sendis al ni dosierŝrankon, unu maŝinon por printi, ktp.

Tiam Pierre Collinge instruis Esperanton en la Universitato de Sherbrooke. Estis pluraj aktivaj esperantistoj en Kebekio en diversaj lokoj.

Kaj en Montrealo?

Jes, jes, estis multaj. Estis eĉ du kluboj en Montrealo: la okcidenta klubo, kaj MEK, Montreala Esperanto-Klubo.

Sed ni diris: "Ni ne havas provincan strukturon." Ĉar la celo de Petro Collinge estis, ke ni enkonduku instruadon de Esperanto. Estis du instruistoj de mezlernejo en Sherbrooke, kiuj pretis instrui Esperanton.

Do ni kunvenis en Saint-Michel-des-Saints, en tiu gastejo de ĉasistoj. Ni plenigis la gastejon. Eble 25 personoj venis, ĉar ili povis tranokti. Kaj ni fondis ESK-on. La celo estis pretigi memuaron por la Ministerio pri Edukado, por ke ĝi agnosku Esperanton kiel akcepteblan studobjekton kaj ke ni povu instrui ĝin.

Estis kampanjo de unu jaro, kaj ni sukcesis. Oni ja instruis Esperanton en mezlernejo en Sherbrooke. La registaro diris: "Ni permesas instruadon de Esperanto, kiam troviĝas taŭga instruisto por instrui ĝin." Ĝi ne celis enkonduki ĝin en ĉiujn



Dum kanada vespero, UK 2022, Montrealo

lernejojn. Ni provis enkonduki ĝin en Longueuil, sed la lernejestro lastminute diris: “Ne, ne, ne. La gepatroj ne tiom favoras.”

Ankaŭ, ĉar Kanado estas granda lando, ne plu estis kanadaj kongresoj. Tuj kiam ni alvenis, ni iris al Fredericton, Nov-Brunsviko, por la Kanada Kongreso. Venis homoj, sed la jaron poste ĝi ne okazis. Estis foje pli koste iri al Kanada Kongreso ol iri al Eŭropo, al pli internacia kongreso.

Tiel ni komencis organizi dufoje jare provincajn renkontiĝojn. Eĉ en urbetoj ni faris ilin, ekzemple en Val-David, por provi disvastigi Esperanton en diversaj lokoj. Ni iris foren eĉ ĉe la norda bordo. Estis nur por kebekianoj.

Ni komencis ankaŭ fari renkontiĝojn inter Kebekio kaj Ontario en la printempo. Kaj aŭtune ni diris: “Do, kion ni faru?” Do ni komencis ISE-on (Internacian Semajnfinon por Esperanto). Ĝi estis Kanada-Usona. Ni diris: “Devas esti internacia.” Sed poste ni pensis: “Estas eble tro pompa nomo, ‘internacia’.” La nomo fariĝis Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE).

Vi organizis multajn internaciajn eventojn en Montrealo: IJK, TAKE, kaj la UK en 2022. Parolu pri tiuj spertoj.

La unua granda evento estis la IJK en 1992. Ni estis tre entuziasmaj kaj junaj. Kaj ĝi estis tre sukcesa. Tiu IJK en Montrealo estis en la kolegio Maisonneuve. Junuloj loĝis kune. Ni flankenpuŝis la benkojn, kaj ili dormis en diversaj klasĉambroj. Aktivecoj estis en la gimnastikejo.

Imagu, ĉi-jare en Graz [dum la UK] estas unu ĉeĥo, kiu ĉeestis ĝin. Li diris al mi: “Mi estis la sola ĉeĥo en via IJK.” Kiam vi aŭdas tion post tiom da jaroj, vi pensas: nekredeble! Ni petis kanadanojn doni monon por helpi tiujn junulojn el la eks-socialismaj landoj veni, ĉar por ili ĝi estis tre multekosta.

Nia unua granda sperto estis fakte antaŭ tio: la antaŭkongreso por la Vankuvera UK en 1984. Ankaŭ

tio estis granda sperto, ĉar ni havis 40 aŭ eble 50 da eŭropanoj kaj azianoj, kiuj venis al Montrealo por preskaŭ plena semajno. Poste ili flugis de Montrealo al la UK en Vankuvero.

Poste, en 2008, estis invito de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kiun partoprenis plurcent homoj. Ĝi estis tiom sukcesa, ke Wally du Temple diris al mi: "Vi tiel bone organizis ĝin, vi estas preta organizi la UK-on."

> "Mi dediĉis 50 jarojn de mia vivo al vere aktiva agado en Esperanto. Mi dediĉis preskaŭ ĉiun tagon."

Vi povas sendube paroli tre longe pri la Montreala UK, kiu devis okazi en 2020 kaj finfine okazis en 2022. Sed ĉu vi havas unu-du plej karajn aŭ plej akrajn memorojn pri ĝi?

Ni invitis fakte por 2017. Ni trovis kongresejon, temon, ĉion, sed UEA akceptis Seulon. Sed ili diris: "Ne zorgu, vi estos en 2020." Sed pro Kovim, fine ĝi okazis nur en 2022.

Mia ĉefa zorgo por 2022? Ni trovis la universitaton UQAM por la kongresejo, kiu estis perfekta. Sed la problemo estis trovi grandan salonon por la malfermo, la fermo, la spektakloj kaj tiel plu. Ni ĉie esploris, sed trovis ĝin nur ĉirkaŭ ses monatojn, eble eĉ malpli, antaŭ la UK. Ni estis tiel bonŝancaj, ke la teatro Cinéma Impérial akceptis nin. Estis inter la lastaj eventoj en tiu teatro, kiun oni estis renovigonta. Tamen estis tre bela sperto en tiu loko, ĉar ĉio estis proksima.

Miaj bonaj memoroj estas, ke homoj ankoraŭ gratulas nin, ĉu ne? Nun, post kvar jaroj, vi iras al UK, kaj homoj diras: "Via UK tamen estis bela."

Kiel vi pensas pri Esperanto nun? Ĝi estis granda parto de via vivo, sed ĝi iom malvigliĝas en la lastaj jaroj. Kiel vi vidas ĝin nun?

Mi ne kulpigas la esperantistojn pri tio, kio okazas en la mondo. Okazas, ke la moderna mondo iras en — mi ne volas diri stultan — sed nekredeblan direkton, kiun vi ne povas gvidi. Estas bedaŭrinde, ke ne nur Esperanto frontas problemojn, sed ankaŭ ekologio. Oni devas agi, kaj tuj agi, pri la klimataj ŝanĝoj, kaj agi por protekti la biodiversecon. Sed tiuj, kiuj estras la mondon, estas la grandaj kompanioj, la riĉuloj, la politikistoj, kaj ili iras en tiun direkton kaj influas, kiel la mondo plu iras.

Vi iĝis sepdekjara en julio de ĉi tiu jaro. Ĉu vi daŭre havas ambiciojn, aferojn, kiujn vi volas fari, aŭ en Esperantio aŭ en la larĝa mondo?

Mi konfesas al vi, ke mi dediĉis 50 jarojn de mia vivo al vere aktiva agado en Esperanto. Mi dediĉis preskaŭ ĉiun tagon.

Kaj nun mi pli ŝatas dediĉi tempon al la protektado de la naturo, ĉar tio gravas, almenaŭ loke, ĉu ne?

Sed mi plu subtenas Esperanton, mi aliĝas, partoprenas. Mi pli intencas nun ĝui la movadon, ĝui Esperanton, uzi ĝin, vojaĝi uzante ĝin.

Mi ne diras, ke mi ne plu organizos, sed, anstataŭ dediĉi grandan parton de mia vivo al Esperanto, mia celo nun estas pli la naturo.

La halifaksa klubo daŭras... **amikeme**

De Bob Williamson
Nov-Skotio

Ĉefa avantaĝo de grupo da esperantistoj estas la amikeco. Oni ofte fanfaronas pri esperantista amikeco: “Nekonata samideano estas via tuja amiko.” Tion mi malkovris en 1983 kiam mi aliĝis al la halifaksa grupeto kiel 30-jarulo kaj novbakita balbutanto, antaŭ ol mi finis la 10-lecionan perpoŝtan kurson sub la gvidado de amikema Kim Keeble. Tiam la grupeton gvidis maljuna spertulo, Harry Lewis, kies nomon la kirurgo kaj profesoro Stevens “Steĉjo” Norvell Jr. poste pruntepreni por nomi la “Libraron Ludovika” kiun li heredis de Harry Lewis, ampleksigis, kaj donacis al KEA.



2005-Berviko, NS: Steĉjo, Kim, Gene, Reni, Marijho, Connie, Bob

Grupano Reni Porter dufoje veturigis kestojn da libroj en sia aŭto de Halifakso al Montrealo por translokigi ĉion. Harry instruis kaj instigis nin, kaj elpensis la ideon por ĉiumonata 3-paĝa gazeteto “Inter Ni”, kiun mi redaktis dum pli ol 20 jaroj. Gene Keyes, kiu anstataŭis min dum jaro kiel redaktoro, kune ekloĝis kun grupano Marijo Graça, unue en Halifakso kaj poste en Berviko, Nov-Skotio. Ĉiu grupano kontribuis laŭ sia kapablo, kaj tiutempe niaj kunvenoj okazis en la propraj domoj de grupanoj. Post sia emeritiĝo, Steĉjo gvidis la grupeton kaj grave kontribuis al “Inter Ni”. Plejofte estis nur babilrondo inter 6 ĝis 10 partoprenantoj (sen aparta programo), kaj tiel la amikeco plifortiĝis.

Pro amikeco mi invitis aliajn grupanojn prezenti siajn memorojn. Kate “Kejt” Porter memoras, ke ŝia patro, Reni Porter, komencis eklerni la lingvon kiam ŝi mem estis knabineto. Reni ofte interesiĝis pri fremdaj lingvoj sed neniam sukcesis eklerni ilin, ĝis Esperanto. Kate ĉiam ŝatis la frandaĵojn ofertitaj dum la kunvenoj ĉe sia domo kaj, kiel 10-jarulino, ŝi trovis la perpoŝtan kurson relative facila. Eksterlandaj gastoj, kiuj vizitis tra Pasporta Servo, fojfoje ŝajnis strangaj al ŝi. Post jaroj, kiam Reni malsanis, ŝi veturigis lin al la kunvenoj ĉe loka kafejo kaj, dum trinkado kaj trikado, ŝi aŭskultis la babiladon. Post lia morto, ŝi daŭris partopreni la kunvenojn ĉar Esperanto memorigas al ŝi pri li, kaj ŝi ŝatas la amikecon.



1989 ĉe la domo de Kate kaj Reni (maldekstre), kun Gene, Steĉjo, David, Marijho, Bob

En 2006, John Huang enmigris el Ĉinio al la bela Halifakso en Kanado, kaj postnelonge trovis la grupeton kaj aliĝis al ĝi. Li havas bonajn memorojn pri ĉiuj partoprenantoj. Ili ĉiuj multe helpis al li lerni kaj plibonigi la parolkapablon en Esperanto. Sinjorino Kim Keeble estis lia Esperanto-instruistino kiam li unue alvenis al Kanado. Post ŝia morto, li portis diversajn objektojn de ŝi al la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang, Shandong-provinco, Ĉinio, por ke tiuj memoraĵoj estu konservataj por la estonteco. Li estas tre dankema al la grupanoj, kaj tre alte taksas la longdaŭran amikecon inter ili. Antaŭ kelkaj jaroj li transloĝiĝis al Misiogo, kaj nuntempe partoprenas la klubajn kunvenojn en Toronto.



2015 en Berviko: John, Kim, Marijho, Bob, Gene, Reni

Andy Blair aliĝis al Esperanto Nov-Skotio proksimume dum la tempo de la pandemio, aŭ ĝuste antaŭe, kaj li memoras, ke li venis al sia unua ĉiumonata kafo-renkontiĝo en Halifakso kaj apenaŭ povis diri ion ajn. Tamen, danke al Duolingo, grupa kaj interreta babilado, lia kapablo pri Esperanto rapide pliboniĝis.

Li jam sciis multon pri Esperanto pro broŝuro, kiun li ricevis kiel 19-jarulo en Nanaimo, kie li tiam loĝis. Laŭ li, rekrutadaj klopodoj kelkfoje bezonas jarojn por produkti fruktojn, sed ili funkcias! Li finfine eklernis la lingvon, ĉar li volis partopreni kaj helpi ĉe la UK de Montrealo. Andy esperas, ke ni povos vigligi nian grupon per varbado de novaj membroj. Tio venos ne pro simpla deziro, sed per aktivaj paŝoj por disvastigi la lingvon kaj prezenti Esperanton al novaj homoj. Pro tio ke 95 elcento de homoj neniam aŭdis pri Esperanto, ĉiu Esperanto-klubo en la lando havas grandegan aŭdantaron kaj potencialon por kreski. Kiel aktivulo, li jam multe kontribuis per sia ekfunkciado de MeetUp-grupoj en Halifakso kaj trans la lando, kaj pri siaj multaj agadoj en Esperantujo. La ĉiudimanĉaj retkunvenoj de Halifakso kaj Ĉikago (troveblaj en EventaServo.org) estas nur unu el liaj amikigaj rezultoj.



2020 en Halifaksa kafejo: Andy, Elizabeth, Dana, John, Samantha, Bob

Ligite al grupa amikeco estas preteco partopreni grupajn agadojn, ĉu ĉeeste ĉu rete. Nuntempe, dank' al interretaj kunvenejoj, neniam estis plimultaj oportunoj. Kiu ne partoprenas, tiu falas el la rondo familia de grupanoj. Tion ni memoru kiam ni pensas pri grupoj, kiujn ni mem povas partopreni. Post 43 jaroj da partoprenado, tion mi facile povas konstati.



2026 – dimanĉa retkunveno gastigita de Andy el Halifakso



Raporteto pri la 111a UK en Graz/Graco

Aŭstrio, 1-8 aŭgusto 2026

De Geoffrey Greatrex, Ontario

Ĉirkaŭ 1100 kongresanoj partoprenis buntan kaj programe riĉan kongreson en la stiria ĉefurbo. Kvankam, laŭ tio, kion mi aŭdis, necesis iam (relative frue) ŝanĝi la kongresejon, la fina loko elektita tute taŭgis: ĝi troviĝis en la urbo-centro, enhavis sufiĉe grandajn ĉambrojn (do neniam necesis promeni aliloken por iuj kunvenoj), kaj estis ĝenerale sufiĉe bone klimatizita.

La muzika programo elstaris, eblis aŭdi koncertojn plurtipajn. Ludis, ekzemple, Kajto, orgenisto William Gross kun Linda Le Nepveu (sopran-kantistino), la du ukrainaj kantistinoj ĴeLe, same kiel Ĵomart kaj Natašа kaj Kajto; tiujn erojn mi ĉeestis kaj tre ĝuis, sed necesis maltrafi aliajn sendube bonajn spektaklojn. Unu vesperon oni dediĉis al 'interkultura teatra kaj kanta spektaklo' kun la titolo 'Sorĉe de verda stelo'. Kunlaboris por surscenejigi ĝin Marcelo Redulez, Kajto kaj la korea kantistino Amira Ĉun; kontribuis belajn fonajn desegnaĵojn por bildigi la aman rakonton korea pentristo, Kyina Choi. La rakonto mem koncernis francan sportiston kaj korean studentinon, kiuj hazarde renkontiĝas kaj kies sorto ŝajne ligiĝas al verdstela kolĉeno, kiun perdas la knabino kaj trovas la knabo. La intrigo disvolviĝis (i.a.) en Sud-Koreio dum la 80aj jaroj, kiam protestis studentoj kontraŭ nedemokratia reĝimo. La muziko ĝenerale bone akompanis la eventojn, sed la tuto finiĝis iom nekonkludige.

La Movada Foiro altiris multajn partoprenantojn. Kompreneble, KEA havis sian budon, kie deĵoris Guy Matte kaj Merle Haltrecht, John Huang kaj mi mem; ni fiere montris



Foto de John Huang

ekzemplerojn de nia nova papera revuo, kiuj rapide elĉerpiĝis. (Foton). Abundis interesaj prelegoj dum la kleriga lundo pri plej diversaj temoj; okazis ankaŭ altnivela esperantologia konferenco, kiel kutime, same kiel serio da aŭtoraj duonhoroj.

Kulturaj eroj aparte abundis. Jam mi aludis grandan muzikan programon. Sed okazis ankaŭ prelegoj pri muziko, ekz. pri aŭstraj komponistoj, same kiel alia pri aŭstraj komponistinoj, kaj teatraĵa versio de la novelo de la aŭstra verkisto Stefan Zweig, *La ŝakludisto,* kiun pretigis Arno Lagrange. Bedaŭrinde, planita diskuto inter la hodiaŭa aŭstra verkisto Clemens Setz kaj István Ertl ne okazis. Dancado dominis ĉe la Nacia kaj la Internacia vesperoj, sed ne mankis tiam muziko. La IKU prelegaro pli grandis ol kutime, aldoniĝis pliaj eroj (ekz. ligitaj al la Akademio Internacia de Sciencoj), kaj oni organizis ankaŭ konkurson de fulmprelegoj, kie tamen la nivelo tre variis.

Konklude, bela kongreso en belega urbeto, kie abundis vidindaĵoj: la ekskursa tago apenaŭ sufiĉis por viziti la fuorton ĉe la monto-pinto kaj la palacon Eggenberg okcidente de la urbo kaj la multajn urbajn muzeojn. La kongresa temo koncernis taŭgan temon, volontuladon, sed la fina rezolucio tro longis por efiki. Estis bele krome revidi kanadanojn ĉe la evento – kaj renkonti novajn.












Foto de John Huang





Ĉe la Praula Fajro

La Korvo kiu ŝtelis la lumon

De Luis Obando
Brita Kolumbio

Ĉi tiu legendo apartenas al Haida-indianoj, kiuj loĝas ĉefe en la insularo Haida Gwaii (en Brita Kolumbio)

En la komenco la mondo estis volvita en sufoka, peza mallumo. La grandaj cedraj arbaroj de la pacifika marbordo ja ekzistis sed nur kiel palpeblaj ombroj, kaj la oceano ondadis sub blinda, senkolora nokto. Ie, en izolita domo, olda ĉefo avare kaŝis la plej grandiozan trezoron de la universo: la lumon mem, garde ŝlositan ene de skulptitaj lignaj kestoj.

Sed la Korvo, karnovora flugilhava estaĵo tute plumkovrita, laciĝis je tiu eterna krepusko. Li sagace ŝpinis ruzan planon por la brilon ŝteli. Li fluginte al la klara rivero, glate sin transformis en etan pinan pinglon tie, kie la filino de la ĉefo estis akvon trinkonta. Kiam ŝi glutis la akvon enhavantan la pinglon, ŝi kvazaŭmirakle gravediĝis. Post nelonge, naskis ŝi viglan bebon de intense akraj okuloj.

La oldulo sian nepon flegeme amis, sed la bebo ploradis senĉese, plenigante la domon per ŝiraj krioj. Liaj larmoj haltis nur kiam li avide proksimiĝis al la kestoj. Venkita de tenero, cedis la avo. Li la unuan keston malfermis, liberigante ĉiajn stelojn, kiuj disŝprucis kiel arĝenta polvo al la vasta firmamento. Poste, li malfermis la lunan keston, pentrante opale la marajn ondojn per brilo iriza.

Finfine, la infano firme postulis la lastan kaj plej grandan keston. Tuj kiam la varma, ora sfero de la suno sur la plankon ruliĝis, la ploranta infano abrupte transformiĝis. Nigraj plumoj eksplodis el lia haŭto, lia vizaĝo akriĝis, kaj liaj brakoj fortikaj flugiloj iĝis. La sunon sekure tenante en sia beko, la Korvo eksvingis siajn flugilojn kaj tra tegmenta trueto ĉielen eskapis.

Li la lumon majestan tra la mondon disĵetis, unuafoje malkaŝante la verdajn valojn, la neĝkovritajn montopintojn kaj la kolosan maron. Ekde tiu tago, la tero neniam plu estis blinda sed pleniĝis je ĉiaj apoteozaj koloroj. La Korvo eble estis ia ruzulo, sed per sia mita trompo, li nin regalis per ĉiuj mirakloj de la lumo.

Sekvante la historiajn spurojn de franclingvanoj en Usono



Intervjuo kun Mario Périard, aŭtoro de la verko « L'Amérique française – De l'Alabama au Wyoming: les racines francophones des États-Unis » (En Esperanto: « Franca Ameriko – De Alabamo ĝis Vajomingo: la franclingvaj radikoj de Usono ». Ni rimarku, ke la libro ĝis nun estas disponebla nur en la franca lingvo.), eldonejo Favre (2026). La libro prezentas bildon de la franclingva influo en la historio de ĉiu el la 50 ŝtatoj de Usono. Mario Périard jam aŭtoris du aliajn verkojn, « L'orthographe, un carcan ? » (2018), pri la skriba normo de la franca lingvo kaj « La grammaire invisible » (2017).

Intervjuis kaj esperantigis Nicolas Viau

Ĉu vi povus prezenti vin kaj poste vian projekton?

Mario Périard: Mi komencis sufiĉe malfrue serioze interesiĝi pri lingvaj temoj, kaj tie eble troviĝas mia ĉefa ligo al Esperanto. Mi malkovris Esperanton, kiam mi estis infano, kaj poste ne plu pensis pri ĝi, sed poste kiel plenkresulo, mi iam ekkonsciis pri tio, ke ĝi daŭre ekzistas. Tio igis min sekvi perpoŝtan kurson. Tio fortigis mian konscion pri lingvoj, kiuj ĉiam estis inter miaj interesoj. Mi poste studis lingvosciencon je universitata nivelo, post kiam mi emeritiĝis. Esperanto rolludis kiel fuelo aŭ kiel katalizilo laŭ tiu vojo. Miaj interesoj iras preter la lingvoj, kaj ankaŭ inkluzivas, grave, la temon de lingvaj komunumoj. Tial mi verkis tiun ĉi libron pri franclingvaj komunumoj en Nordameriko.

La tezo de mia verko estas, ke la franclingveco de la karaktero de Usono estis historie kaŝita, kvankam franclingvanoj ja estas unu el ĝiaj fondintaj popoloj.

Jen miaj intelektaj interesoj: lingvoscienco kaj lingvaj komunumoj.

Legante la libron, oni povas surpriziĝi malkovrante, ke franclingvujo en Usono ne nur ekzistis en Luiziano aŭ en Nov-Anglio, por mencii la plej konatajn ekzemplojn el nia kebekia kaj kanada vidpunkto, sed ekzistis tra ĝia tuta teritorio. Ĉu vi povas rakonti iom pli? Vi vojaĝis tra multaj lokoj en Usono, kaj en la libro vi pritraktas la 50 ŝtatojn. Ĉu tio estis por vi ankaŭ surprizo?

MP: Mi ne atendis trovi spurojn en ĉiuj el la 50 ŝtatoj. Mi malkovris tion ne nur per vojaĝoj, sed ankaŭ per esplora laboro. Nur per dokumentaj esploroj mi eksciis pri franca ĉeesto en tiuj lokoj. Mi miris! Mi ekkonsciis pri tio, ke kompreneble aliaj lingvaj komunumoj ludis gravan rolon en Usono, sed verŝajne la franclingva komunumo estas la sola, kiun eblis trovi en ĉiu el la 50 ŝtatoj. Nur la hispana ĉeesto simile disvastiĝis, sed pensu tamen, ke ekzemple Vermonto ne havas historian hispanan influon. Temas pri unu el la unikaĵoj de la franclingva influo. Alia unikaĵo estas, ke ĝi estis la sola, kiun oni nevidebligis.

Via verko en pluraj partoj spegulas la fortan interplektiĝon de franceco kun la indiĝenaj popoloj (kiun vi nomas, en la franca, « francoautochtonie » (Tiun vorton oni povus esperantigi kiel « francindiĝeneco ».), kiuj multe miksiĝis, dum sufiĉe longa tempo. Pri tiu ĉi kultura tavolo oni sufiĉe bone konscias en Kebekio kaj Kanado, kie ĝi estas ligita al la historio kaj socia imagaro de la peltkomercistoj kaj ties aktivaĵoj, kaj ankaŭ al tiuj de la Metisoj de okcidenta Kanado. Sed vi ankaŭ parolas pri aliaj franclingvaj grupoj, kiuj same enradikiĝis en Nordameriko, ekzemple la frue alvenintaj Hugenotoj (protestantaj francoj) sed ankaŭ pri militistoj, kiuj venis okaze de la Milito de sendependiĝo. Ĉu ankaŭ tio surprizis vin?

MP: Oni multe ligas Nordamerikan francecon al Nov-Francio. La franca ĉeesto iris tamen preter la limoj kaj historiaj kaj teritoriaj de Nov-Francio. Peltkomercistoj ekzemple iris ĝis la Pacifika Oceano, kiun Nov-Francio ne atingis. Nov-Francio finiĝis en 1763

sed post tio plu vivis franceco, grave pere de tiu « francindiĝena » mondo, kiu verŝajne daŭris ĝis la Usona Enlanda Milito, kaj poste iom post iom forvelkis.

Pri Hugenotoj, ili estis la veraj pioniroj de Usono. Ili estis la unuaj Eŭropanoj alvenintaj al la Usona teritorio, ĉefe en la nuna Florido, en 1562. La restado en Florido fakte ne daŭris tre longe, ĉar la setlintoj estis forpelitaj fare de la hispanoj, kiuj same ne longe restis surloke. Ili tamen alvenis antaŭ la angloj.

La Hugenotoj estis rifuĝintoj, sed ne la solaj. Ĉiuj tumultoj de la historio de Eŭropo estigis ondon de rifuĝintoj: aristokratoj post la Franca Revolucio, militaj oficiroj post la malvenko de Napoleono, ili fondis komunumojn, ekzemple en Teksaso aŭ en Alabamo... estas pluraj tavoloj de franclingvanoj. Tiujn homojn fakte ligis nur la franca lingvo. La Hugenotoj estis protestantaj, la franckanadanoj estis katolikaj... ĉiuj nur estis ligitaj pere de franceco.

Via projekto ne inkluzivas franclingvanojn en Kanado ekster Kebekio. Kvankam ni konscias pri tiu ekster-Kebekia franclingvujo ĝenerale, ĉu ne estus ankaŭ malkovrindaĵoj tie?

MP: Mi fokusiĝis je Usono pro du kialoj. Malgraŭ la fakto, ke la franclingvanoj suferis diskriminacion en la anglalingvaj provincoj, Kanado ĉiam agnoskis, ke parto de sia karaktero estis franclingva. Eble ĝi ne havis alian elekton, pro la alta nombro de franclingvanoj! Mi ne sentis bezonon malkaŝi tiun aspekton, pri kiu ni finfine havas relative bonajn sciojn. Eĉ en la Okcidento, ni konas la rakonton pri Louis Riel, ekzemple.

Male, Usono prezentas sin kiel anglosakseca lando, kun nur unu fondinta popolo, kies « evidenta destino » (« Manifest Destiny ») estis disvastiĝi en kontinento, kiun ili taksis « sovaĝa », kadre de konflikto inter « bonuloj », kiel ili vidis sin mem, kaj « malbonuloj » el sia vidpunkto, la indiĝenaj popoloj. En tiu rakonto, kiun eblas percepti per holivudaj filmoj, franclingvanoj ne ekzistas, malgraŭ ilia grava historia ĉeesto samtempe kiel la indiĝenaj popoloj kaj la hispanlingvanoj. Tri el la « fondintaj popoloj » ja estas reprezentitaj, sed ne la franclingvanoj!

Alia kialo estis profiti la okazon de la 250-a datreveno de la sendependiĝo de Usono por instigi pensadon pri la rilatoj inter franclingvanoj kaj amerikeco.

Komence de la libro, vi ankaŭ inkluzivis kelkajn vortojn, ĉerpitajn el la verkaro de la kebekia poeto Gilbert Langevin, kiu proponis la vorton « Amériquois » (Oni povus proponi, ke « Amériquois » estu esperantigita kiel « Amerikeza »), kreitan surbaze de la franca vorto « Amérique » (Ameriko) kaj finas kiel « Québécois » (Kebekiano), sed ankaŭ kun « Iroquois » (Historia franca nomo por la Haudenosaunee-popolo, ankaŭ historie konata en Esperanto, kiel « Irokezoj »), por priskribi la Nordamerikan franclingvujon. Ĉu tiu nomo estas laŭ vi alpropriginda?


MP: En la finaj vortoj, mi demandas min, kiel ni, franclingvanoj, devus nomi nin. Ni ne povas esti nuraj francoj, ili estas de Eŭropo. Ni ankaŭ ne nur povas nomi nin franckanadanoj: ni ankaŭ estis en Usono. Kaj kion diri pri Hugenotoj? Kiel arigi ĉiujn ĉi homojn, kies komuna kulturo estas ja franceca, sed ankaŭ amerika? Kulturo, kiu ankaŭ enkalkulu specifecon sian: miksitecon. La hispanlingvanoj ja ankaŭ sufiĉe miksiĝis, sed plejparte tion ne faris la angladevena loĝantaro. La termino « Amériquois », de Gilbert Langevin, ankaŭ uzata en kanto de la muzikgrupo « Le Vent du Nord », ŝajnas al mi tute taŭga. Ni estas iom el ĉio ĉi!

Ĉu vi ŝatus aldoni ion kiel konkludon?

MP: Mi ŝatus mencii mian venontan projekton, kiu plej verŝajne interesos la esperantistaron: libro pri justa internacia komunikado. Ĝi ekzamenos la historion de la nuna lingva hegemonio, tiun de la angla. Ne temos pri admonaro kontraŭ la angla lingvo mem, sed pri kritiko de ties hegemonia statuso, kiu estas fonto de maljusta situacio internacie. La libro ankaŭ reliefigos kelkajn eblajn solvojn, inkluzive de Esperanto, kiu ŝajnas esti la plej praktika. Mi jam trovis la titolon: « Une langue pour les dominer tous – Chroniques d'une hégémonie annoncée »! (« Unu lingvo por regi ilin ĉiujn – Kronikoj de hegemonio antaŭsignita ») Mi esperas, ke la libro estos publikigita en 2027. Mi ŝatus ankaŭ ekskludi Esperanton el la eldonaj rajtoj, por ebligi laŭeble plej malmultekostan dissendon de la verko ene de Esperantujo. Jen miaj estontaj projektoj!

Mi cetere aldonu, ke angla versio de la libro « L'Amérique française » estas nun preta kaj serĉas eldoniston. Se hazarde troviĝas inter la legantaro de « Lumo » homoj kun kontaktoj en la anglalingva eldonejaro, mi volonte aŭskultos ilin!

Sur la piste de l'histoire des francophones aux États-Unis



Entretien avec Mario Périard, auteur de l'ouvrage « L'Amérique française – De l'Alabama au Wyoming : les racines francophones des États-Unis», éditions Favre (2026). Le livre brosse un portrait de l'influence francophone dans l'histoire de chacun des 50 États des États-Unis.

Pourrais-tu te présenter puis présenter ton projet?

MP: J'ai commencé assez tard à m'intéresser sérieusement aux questions de langue, et c'est peut-être là mon principal lien avec l'espéranto. J'ai découvert l'espéranto enfant, sans plus y penser, mais c'est à l'âge adulte que j'ai pris conscience qu'il existait encore. Cela m'a amené à suivre un cours par correspondance. Cela m'a éveillé aux langues encore plus – cela avait toujours été un intérêt chez moi. J'ai par la suite entrepris des études universitaires de linguistique, après avoir pris ma retraite. L'espéranto a un peu joué un rôle de carburant ou de catalyseur dans ce parcours. Mes intérêts dépassent la langue en tant que telle, pour englober notamment les communautés linguistiques. Cela m'a amené à concevoir le présent ouvrage, sur le sujet des communautés linguistiques francophones en Amérique du Nord.

La thèse de mon livre est que le côté francophone de la personnalité des États-Unis a été caché historiquement, alors que les francophones constituent un de leurs peuples fondateurs.

Voici donc mes préoccupations intellectuelles : la linguistique ainsi que les communautés linguistiques.

À la lecture du livre, on peut être surpris de constater que la francophonie étasunienne n'a pas été présente qu'en Louisiane ou en Nouvelle-Angleterre, pour reprendre les exemples les plus connus à partir de notre perspective québécoise et canadienne, mais vraiment sur l'ensemble du territoire. Peux-tu nous en dire plus? Tu as fait des voyages dans plusieurs endroits aux États-Unis et tu traites des 50 États. Était-ce une surprise pour toi aussi?

MP: Je ne m'attendais pas à ce qu'il y en ait dans chacun des 50 États. Ce n'est pas juste par des voyages que j'ai découvert cela, mais aussi par un travail de recherche. Ce n'est donc que par mes recherches que j'ai appris l'existence d'une présence française à ces endroits. Cela m'a étonné! Je me suis rendu compte que, bien sûr, d'autres communautés linguistiques ont joué un rôle important aux États-Unis, mais c'est probablement la seule qui ait eu une présence dans chacun des 50 États. Seule la présence espagnole a peut-être été aussi étendue, et encore, le Vermont, par exemple, n'a pas d'empreinte espagnole historique. C'est une des singularités de l'empreinte des francophones. Une autre singularité est qu'il s'agit de la seule à avoir été invisibilisée.

Ton ouvrage reflète à bien des endroits la forte imbrication entre la francité et les peuples autochtones (la « francoautochtonie »), qui se sont beaucoup mêlées, sur un temps assez long. Cette strate culturelle en est une dont nous avons une certaine conscience au Québec et au Canada, où elle est liée à l'histoire et à l'imaginaire des coureurs des bois, du commerce des fourrures ainsi qu'à celle des Métis de l'Ouest. Mais tu évoques aussi d'autres groupes francophones qui se sont eux aussi établis en Amérique du Nord, par exemple les Huguenots (Français protestants), arrivés tôt ou encore des militaires arrivés au moment de la Guerre d'Indépendance. Cela a-t-il aussi été une surprise pour toi?

MP: On associe beaucoup la francité nord-américaine à la Nouvelle-France. La présence française a toutefois débordé des frontières de la Nouvelle-France dans le temps comme dans l'espace. Les coureurs des bois se sont par exemple rendus jusqu'au Pacifique, alors que la Nouvelle-France ne s'étendait pas jusque-là. La Nouvelle-France a par ailleurs pris fin en 1763, mais la vie française a néanmoins continué, notamment incarnée par un monde « francoautochtone » qui a persisté probablement jusqu'à la veille de Guerre de Sécession, pour s'étioler graduellement par la suite.

Quant aux Huguenots, ils sont les véritables pionniers des États-Unis. Ils ont été les premiers Européens à s'être établis sur le territoire des États-Unis, notamment dans la Floride actuelle, en 1562. Ça n'a d'ailleurs pas duré très longtemps, en Floride, puisqu'ils ont été délogés par les Espagnols, qui ne sont pas restés longtemps non plus. Ils y ont toutefois précédé les Anglais.

Les Huguenots étaient des réfugiés, mais pas les seuls. Les soubresauts de l'histoire européenne ont chacun causé leur vague de réfugiés : aristocrates suite à la Révolution française, officiers militaires après la défaite de Napoléon, qui sont allés fonder des communautés, comme au Texas ou en Alabama... il y a plusieurs couches de francophones. Ces gens n'étaient par ailleurs liés que par la langue française. Les Huguenots étaient protestants, les Canadiens français, catholiques... tous liés par la « francité » seulement.

Ton projet ne couvre pas la présence française au Canada hors du Québec. Bien que nous ayons conscience de la présence francophone hors Québec de manière générale, n'y a-t-il pas là non plus des histoires à découvrir?

MP: Je me suis concentré sur les États-Unis pour deux raisons. Malgré la discrimination subie par les francophones dans les provinces anglophones, le Canada a toujours reconnu qu'une partie de sa personnalité était francophone. Peut-être n'avait-il pas les moyens de faire autrement, étant donné la présence numériquement importante des francophones! Je n'ai pas senti le besoin de faire découvrir un aspect somme toute relativement connu Même pour l'Ouest, nous connaissons l'histoire de Louis Riel, par exemple.

Les États-Unis, au contraire, se projettent comme un pays anglo-saxon, sans autre peuple fondateur, dont la « destinée manifeste » (« Manifest Destiny », en anglais) était de s'étendre sur un continent qu'ils percevaient comme « sauvage », dans un affrontement entre « bons », comme ils se voyaient eux-mêmes, et les « méchants » de leur point de vue, les peuples autochtones. Dans ce récit, perceptible dans les productions hollywoodiennes, les francophones n'existent pas, malgré leur présence historique importante aux côtés des Autochtones et des hispanophones. Trois des « peuples fondateurs » y sont représentés, mais pas les francophones!

L'autre raison est que je voulais profiter du momentum du 250 anniversaire de l'indépendance américaine pour susciter une réflexion sur le rapport des francophones à l'américanité.

Au début de ton livre, tu as inclus quelques mots de Gilbert Langevin, qui emploie le terme « Amériquois », mot qui à consonance française construit sur « Amérique », et qui rime avec « Québécois » et « Iroquois »(Nom historique en français du peuple Haudenosaunee.)... Est-ce un terme que tu revendiques pour décrire la francophonie nord-américaine?

MP: Dans l'épilogue à la fin, je me pose la question de savoir comment nous, francophones, devrions nous nommer. Nous ne pouvons être simplement des Français, qui sont en Europe. Nous ne pouvons pas non plus simplement nous dire canadiens-français : nous avons aussi été aux États-Unis. Et qu'en est-il des Huguenots? Comment regrouper tous ces gens qui participent d'une culture commune française, mais aussi d'Amérique? Une culture tenant compte de la particularité du métissage. Les hispanophones se sont eux aussi assez métissés, mais la population anglo-saxonne, assez peu. Le terme « Amériquois », de Gilbert Langevin, aussi utilisé dans une chanson du groupe « Le Vent du Nord », me semble tout à fait approprié. Nous sommes un peu tout cela!

Souhaites-tu ajouter quelque chose pour conclure?

MP: J'aimerais évoquer mon prochain projet, qui intéressera certainement les espérantistes : un livre qui traitera de communication internationale équitable. Il retracera l'histoire de l'hégémonie linguistique actuelle, qui est celle de l'anglais. Il ne s'agit évidemment pas d'un réquisitoire contre la langue anglaise elle-même, mais plutôt une critique de son statut hégémonique, source d'une situation inéquitable au plan international. Le livre fera aussi ressortir quelques solutions envisageables, dont celle de l'espéranto, qui me semble être la plus pratique. Mon titre est déjà trouvé : « Une langue pour les dominer tous – Chroniques d'une hégémonie annoncée »! L'ouvrage paraîtra, je l'espère, en 2027. Je souhaiterais aussi exclure l'espéranto des droits d'édition, pour permettre une diffusion au plus bas coût au sein de la communauté espérantiste. Voici mes projets d'avenir!

Ajoutons par ailleurs qu'une version anglaise du livre « L'Amérique française : de l'Alabama au Wyoming » est maintenant prête et en recherche d'un éditeur. Si jamais des personnes parmi le lectorat de « Lumo » avaient des contacts dans le milieu de l'édition anglophone, je serai à l'écoute!

Movado

Leteroj pri la nova LUMO



Kontribuo de Frank Meijer

(Kemptville, ON)

Mi ŝategas la presitan Lumon. La enhavo estas diversa kaj interesa, kaj la revuo estas vere bela.

Nun pri la formato. Ni konsideru **kial** KEA/ESK faras presitan revuon. Mi opinias ke unu el la motivoj estu ke ĝi servu kiel prestiĝa "vizitkarto" de la Kanada Esperanto movado, t.e. fizika pruvo de nia ekzisto, kapablo kaj seriozeco. De tiu vidpunkto, oni tuj devas vidi ke temas pri revuo, periodaĵo.

Tial mi preferas la grandan formaton (de la unua numero), ĉar miaopinie la malgranda (dua) formato pli similas al broŝuro.


Samargumente, mi pensas ke la kovrilo ne bezonas esti pli dika ol la enaj paĝoj. Speciale ĉar tio verŝajne altigas la koston.

Pri abono, mi volonte pagos por altkvalita revuo. Sed mi komprenas, ke vi volas ke ĉiuj membroj ricevu la presitan revuon, dum ne ĉiuj membroj povas aŭ volas pagi altan monsumon.

Eble oni enkonduku nova(j)n membro-kategorio(j)n. Ekzemple (nur ekzemple):

- Baza $25 jare (anstataŭ $14)
- Subtena $50
- Mecenato $100

Dankon por la laboro de ĉiuj kiuj kontribuis al tiu projekto!



Dankegon pro la bela LUMO
kiun mi ricevis hieraŭ la
duan de majo. La intervjojn mi
tre ŝatas ĉar ĝi la prezitaj viv-
dotaloj de persono donas al mi
ian amikecon kiun mi verŝajne
ne povus atingi ĉe granda
kongresa evento. Persono kiuj
ne povas ĉeesti eventojn povas
almenaŭ senti sin ligitaj al la
komunumo.
Mi tre feliĉe pagos por la sendado
de papera versio de LUMO. Ĝi
enirigos lumon en mia vivo —
kaj nun, mi iros promeni en la
arbaro kie la arboj farigas miajn
amikojn.
Bonan tagon al vi ĉiuj kiuj
kunlaboras por krei ĉi tiu LUMO
Ŝila Devlin.

Kontribuo de Trefleo Mercier *(Ŝerbruko, KE)*

Mi persone ŝatas la novan pli malgrandan formaton. Ĉio teknika - bildoj, koloroj, dezajno ktp - estas agrabla kaj profesia. Tiu revuo reprezentas multan laboron, mi konscias pri tio.



Paralela Universo 2026




Paralela Universo estas unutaga festo de Esperanto, okazanta en diversaj lokoj samtempe. La eventoj inkluzivas tagmanĝon, grupan agadon, vespermanĝon, kaj daŭras proksimume de 12:00 ĝis 20:00. La aranĝo okazas sinsekve ekde 2016. Kvankam ĝi komenciĝis en Nord-Ameriko, nun ĝi jam okazas ankaŭ en pluraj kontinentoj. Laŭ decido de la Organiza Komitato ĝi okazas ĉiun trian sabaton de aŭgusto.

Ĝin fondis Jed Meltzer de Toronto por doni la oportunon paroli Esperanton reale, ne rete, renkonti novajn amikojn, kaj ricevi ĝuindajn memorajĵojn. La celo de la organizantoj estas ke ĉiu kiu volas partopreni, povu fari tion sen vojaĝi tro malproksime. Plej bone estas, se oni povus atingi eventon en malpli ol kvar horoj.

En 2026, ĝi okazis la 15an de aŭgusto en tri urboj en Kanado kaj kvar lokoj en Usono (plus unu en Italio).

Bedaŭrinde, PU iomete malvigliĝis dum la lastaj du, tri jaroj. Estus bone pli vaste konigi PU al Esperantistoj en Kanado kaj eksterlande. Laŭ mia sperto, ĝi estas valora kaj ĝuinda evento kaj mi ŝatus vidi ĝin en multe pli da urboj.

Garry Evans



Halifakso

En Halifakso, Nov-Skotio, esperantistoj kunvenis por agrabla suna promenado tra la famaj Publikaj Ĝardenoj, antaŭ ol promeni tra la urbocentro al la akvorando. Danke al portanta grandan EO-flagon, multaj scivolemaj homoj demandis, kiun lingvon ni parolas aŭ “El kiu lando estas la flago?” Estas bone, ke ili portis sufiĉajn pamfletojn enkondukantajn Esperanton, ke multaj homoj estis edukitaj pri la lingvo por la unua fojo. La promenado iris trans la halifaksan akvorandon, plenplena de turistoj, kaj finiĝis ĉe la loka glaciaĵejo Cows por bongustaj manĝetoj.

Andy Blair



Montrealo

Historiplena kunveno okaze de Paralela Universo en Montrealo

Ni kutimas, en Montrealo, okazigi Paralelan Universon. Ĉi tiun jaron, Paralela Universo (tutmonde) okazis la 15-an de aŭgusto. Tiu dato havas kelkajn signifojn. Temas interalie pri la dato de la nacia tago de Akadio.

Estis do tre oportuna tago por paroli pri franclingvaj pioniroj en Nordameriko, ne nur en Kanado sed ankaŭ en Usono: la kunveno estis okazo renkontiĝi kun la esperantisto kaj verkisto Mario Périard kaj babili pri lia nova libro « L’Amérique française – De l’Alabama au Wyoming: les racines françaises de l’Amérique » (« Franca Ameriko – De Alabamo ĝis Vajomingo: la franclingvaj radikoj de Usono »), publikigita pere de la svisa eldonejo Favre en la printempo de tiu ĉi jaro, pri la historia franclingva influo (foje forta, sed ofte forgesita) en ĉiu el la 50 ŝtatoj de la nuna Usono.

Partoprenis 15 homoj, inter kiuj kelkaj scivolemuloj! Paralela Universo, kiun ni provas laŭeble (kiam la vetero ebligas la aferon) organizi en trankvila kaj tre neformala somera etoso, ĉiam estas bona okazo bonvenigi novulojn!

La evento okazis en du partoj: unue, pikniko en parko. Poste Mario Périard klarigis al la ĉeestantaro sian plej lastan verkon (legu la intervjuon en tiu ĉi numero de Lumo por ekkoni la detalojn). Mario jam estis intervjuita de diversaj eŭropaj kaj kebekiaj amaskomunikiloj por paroli pri sia libro. Estis do honoro por la ĉeestantoj ekscii pli pri tiu ĉi nova verko, verkita de Esperantisto (kaj fakte estas eta rilato kun nia lingvo!).

Alia kebekia Esperantisto, François Bolduc, ankaŭ ĉeestis la aranĝon kaj parolis pri grava literatura iniciato, la Interkultura Novela Konkurso,

nun subtenata de aktiva plurlanda teamo. Inaŭgurita kiel Esperanta konkurso kies premioj estis anoncitaj dum la Universala Kongreso en Montrealo en 2022, ĝi estas nun multlingva kaj ege internacieca. Ĉi tiun jaron oni lanĉas jam la 7-an eldonon, kiun eblas partopreni en 14 lingvoj (inkluzive de Esperanto). Estis ankaŭ bona okazo prezenti varban libreton, kiu enhavas tri finalistajn novelojn de la 6-a eldono.

La grupo poste transiris al apuda historia loko: Maison Saint-Gabriel (« Domo Saint-Gabriel »), en kiu oni siatempe (en la 17-a jarcento) bonvenigis la tiel nomatajn « filles du Roy » (“filinojn de la reĝo”), senditajn el Francio por pliigi la loĝantaron kaj kontribui al la evoluigo de la kolonio. La grupo havis la eblon viziti la domon kaj vidi kaj babili kun historiaj rekonstruantoj, kiuj prezentis la vivmanieron de tiu epoko.

Ni montrealanoj celas plu okazigi Paralelan Universon estontece, kaj provas elpensi novan programon ĉiun fojon.

Do, ĝis la venonta jaro (aŭ ankaŭ kadre de alia kunveno)!

Nicolas Viau

Toronto

Bedaŭrinde la evento en Toronto estis nuligita pro manko da partoprenantoj. Mi esperas havi pli da sukceso venontfoje.

Jed Meltzer

Viktorio

Mi planis celebri Paralela Universo la 15-an de Aŭgusto. Sed ĉar nia klubo estas tre malgranda kaj kelkaj ne povis veni ĉi tiun tagon ni kunvenis en mia loĝejo, ankaŭ konata kiel Kafejo Ĉarmo, la 22a anstataŭe kun kafo, teo, manĝaĵoj, glaciaĵo kaj klare multe de vivoplena konversacio. Ili alvenis je la 1.30-a horo kaj adiaŭis je la 5-a.

En la bildo vi povas vidi Maria kaj Paul Hopkins, Andrew Sly, kaj Matthew Orlom. Ni provis preni memfoton sed ne sukcesis, do mi estis nomumita fotisto. La klubanoj estas malfeliĉaj ke Olga kaj Wally du Temple ne povis partopreni. Esperantisto Alberto, kiu lastatempe transloĝiĝis de Meksiko, ankaŭ ne povis veni.

La klubo ne estas granda sed ĉiuj estas plenaj de espero ke ni daŭre kunvenos kiam eblas.

Lottie Ericson





Kulturo

La propra Odiseado de Abel Montagut: Kiel traduki Homeron al Esperanto

Intervjuita de Geoffrey Greatrex

Intervjuo por la revuo Lumo (Kanado)

Lastatempe, Homeron kaj liajn verkojn oni multe priparolas. La nova filmo de Christopher Nolan, *Odyssey* — laŭ sia angla titolo — kaptis grandan atenton kaj ĝenerale pozitivajn recenzojn, kun notinda escepto, tamen, de tradukistino de la verko, Emily Wilson, kiu nuntempe okupiĝas pri dua traduko. Pro ĉi tiu intereso, la redakcio de *Lumo* taksis la momenton oportuna por starigi kelkajn demandojn al la kataluna verkisto Abel Montagut, kiu antaŭ pluraj jaroj verkis sian propran epopeon, *Poemo de Utnoa*, kaj antaŭ nelonge finis sian versan Esperantan redonon de *Odiseado*.

Saluton, Abel. Jen kelkaj demandoj por vi!

Saluton, Geoffrey. Mi ĝojas denove renkonti vin post la UK en Torino 2023.

Unue, kiel plej bone aludi en Esperanto la faman verkon de Homero: ĉu *Odiseo*, ĉu *Odiseado*?

La distingo estas nun sufiĉe klara: *Odiseo* estas la heroo, reĝo de Itako, edzo de Penelopa kaj patro de Telemaĥo; *Odiseado* estas la fama poemo de Homero pri lia hejmeniro post la falo de Trojo. Antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj ekzistis en Esperanto iom da konfuzo inter la du formoj, sed la tradicio firmiĝis. Same kiel ni nomas la verkon de Vergilio *Eneado*, ni nomas tiun de Homero *Odiseado*.



Ĉu vi havas vidpunkton pri la lastatempa filmo *Odyssey* de Christopher Nolan?

Endas diri, ke Nolan ŝanĝas multajn epizodojn kaj temojn: la lotuson, la Ciklopon, la sorĉistinon Kirke, la Sirenojn, la Trojan ĉevalon... Ili estas imagataj alimaniere ol ni kutimas. Kelkajn aliajn temojn kaj rolulojn li preterlasas. Tamen mi ŝatis la filmon. Laŭ mi, temas pri inteligenta modifado de la plej famaj epizodoj, eĉ pri persona ludo kaj esploro de nova perspektivo kaj maniero rakonti la "historion" de Odiseo. Kvazaŭ la reĝisoro estus informiĝinta per fontoj nur parte koincidantaj kun tiuj de Homero. Sed, laŭ mi, Nolan profunde respektas kaj transdonas esencajn trajtojn de la heroo kaj de la rakonto. Kompreneble, eblas malsamaj interpretoj. Ĉi tiu filmo kaj aliaj freŝdataj, kiel *The Return* (*La reveno*), de Uberto Passolini, kun Ralph Fiennes kaj Juliette Binoche, vekas ĉe la spektanto la deziron legi aŭ relegi rekte la homeran rakonton kaj kompari.

Kiajn defiojn vi frontis dum vi tradukis la verkon en Esperanton?

Mi precizigu, ke mi deiris unuavice de bona, jam antaŭ longe eldonita proza esperantigo de *Odiseado*. Ĝin faris W. J. A. Manders, kaj ĝi aperis en 1933, do antaŭ pli ol naŭdek jaroj. Dum tiu tempo nia lingvo rimarkinde evoluis kaj riĉiĝis. Dum mia versigado kaj revizioj, mi abunde kaj konstante konsultis la grekan originalon kaj ĉi-rilatajn verkojn kaj helpilojn, kiel la retejojn *Eulexis* kaj *Perseus*. La plej granda defio por mi estis trovi taŭgan verson por esprimi la enhavon kaj nuancojn de la originalo kiom eble vers-al-verse, ĉar neniu el la pli fruaj versmodeloj en Esperanto konvinkis min, laŭ mia persona prijuĝo. Ankaŭ la propraj nomoj postulis multan pripenson: Manders simple transskribis ilin, ekzemple *Odusseus*, *Telemachos*, *Aphrodite*, *Ithaka*, dum en mia versigo ili devis ricevi Esperantan formon, almenaŭ por natura kaj ĝusta prononcado. Krome, la homeraj epitetoj ĉiam prezentis apartan defion. Sed ili ebligis ankaŭ kreivon, surbaze de la originalo kaj de la proponoj de Manders: "la belkruringaj Akeoj", "la rozafingra Aŭroro", "Pozidono terskua", "Naŭzikaa, la blanka-kubuta", "la ŝipoj fortbenkaj"...

Ĉu via antaŭa sperto pri komponado de epopeo helpis vin?

Certe. Ankaŭ rilate al *Poemo de Utnoa* mi bezonis longe esplori kaj praktike serĉi adekvatan verson, similan al la heksametro. Jam tiam, antaŭ ĉirkaŭ tridek kvin jaroj, mi konstatis, ke la Esperanta akcenta heksametro bezonas certajn adaptojn aŭ ŝanĝojn por bone funkcii en longa rakonta poemo. Aliflanke, por konstrui la intrigon de *Poemo de Utnoa* mi enprofundiĝis, inter aliaj verkoj, ankaŭ en *Odiseadon*, parte en la originala greka teksto. Mi faris versajn tradukprovojn el specimenoj de la homera verko, kiujn mi sendis al William Auld en 1987 kaj 1988. Do, laŭ pluraj manieroj, mia laboro pri *Utnoa* estis antaŭpreparo por ĉi tiu versigo de *Odiseado*.

Kiujn aliajn tradukojn de helenaj verkoj oni atendas dum la venontaj jaroj?

Laŭ mia scio, nun estas prilaborataj du apartaj versaj tradukoj de *Iliado*, fare de Nicola Ruggiero kaj de Kirilo Brosch, kiuj komencis sian entreprenon sendepende, preskaŭ samtempe. Menciindas ankaŭ, fare de la unua, la *Teogonio* de Heziodo kaj, fare de la dua, la anonima *Batraĥomiomaĥio*, aŭ *La ranmusbatalo*, mallonga humura verko, parodianta la stilon kaj mondon de Homero. Krome, fare de vi mem, estas aperonta *Pri la persaj militoj* de Prokopio. Aliflanke, la senlaca Gerrit Berveling tradukis multajn verkojn ankaŭ el la antikva greka, interalie el Lukiano, Longos, Filono de Aleksandrio, Sapfo kaj Anakreono. Krom la tradukoj rekte el la antikva greka, indas mencii la jam kompletigitan verkon de Miguel Fernández, *La Troja milito, kiun mi rakontis al mia nepino*: pasian, tre lertan kaj klaran rakonton pri la tuta ciklo de la Troja milito.

Kial daŭre tiom popularas la verkoj de la klasikuloj, precipe el la antikva greka?

Laŭ mia opinio, ĉar ili traktas spertojn kaj demandojn, kiuj restas esence homaj: amon kaj morton, militon kaj pacon, hejmon kaj ekzilon, ambicion, potencon, familion, timon kaj esperon, fantazion kaj realon. La grandaj klasikuloj havas eksterordinaran kapablon renaskiĝi en novaj epokoj kaj per novaj artaj formoj. Ĉiu generacio povas legi Homeron, Sofoklon aŭ aliajn grekajn verkistojn laŭ sia propra vidpunkto. Tial iliaj verkoj povas fariĝi teatraĵoj, filmoj, komiksoj aŭ novaj rakontoj, eĉ se tre malsamaj aŭ kontraŭdiraj. La originalaj verkoj restas, sed ĉiu epoko denove dialogas kun ili — kaj eble ĝuste pro tio ili ankoraŭ vivas.



La unuaj alineoj de Odiseado

[originala]

ἄνδρα μοι ἔννεπε, μοῦσα, πολύτροπον, ὃς μάλα πολλὰ
πλάγχθη, ἐπεὶ Τροίης ἱερὸν πτολίεθρον ἔπερσεν·
πολλῶν δ᾽ ἀνθρώπων ἴδεν ἄστεα καὶ νόον ἔγνω,
πολλὰ δ᾽ ὅ γ᾽ ἐν πόντῳ πάθεν ἄλγεα ὃν κατὰ θυμόν,
ἀρνύμενος ἥν τε ψυχὴν καὶ νόστον ἑταίρων.
ἀλλ᾽ οὐδ᾽ ὣς ἑτάρους ἐρρύσατο, ἱέμενός περ·
αὐτῶν γὰρ σφετέρῃσιν ἀτασθαλίῃσιν ὄλοντο,
νήπιοι, οἳ κατὰ βοῦς Ὑπερίονος Ἠελίοιο
ἤσθιον· αὐτὰρ ὁ τοῖσιν ἀφείλετο νόστιμον ἦμαρ.
τῶν ἀμόθεν γε, θεά, θύγατερ Διός, εἰπὲ καὶ ἡμῖν.

[El la Esperanta traduko* de Abel Montagut]

Rakontu al mi, Muzo, pri l' multevoja viro, tre longe
vaginta post ol li detruis la sanktan Trojan fortreson;
de multaj homoj l' urbojn vidis kaj karakteron ekkonis;
multajn dolorojn kore li sur la maro suferis, penante
mem supervivi kaj revenon de la kunuloj ebligi.
Sed li ne savis la kunulojn, eĉ se li strebis plej arde;
ĉiuj pereis pro sia malprudento, ĉar voris,
stultuloj, la bovojn de la Suno, la Supre Vojanta,
kiu de ili rabis la tagon hejmenrevenan.
Ekde kie ajn, Zeŭsidino, al ni pri tio rakontu.

(provizora traduko de lia plena traduko de Odiseado, kiu probable aperos en 2027)*

[El la Esperanta traduko de W. J. A. Manders]

Rakontu, ho Muzo! al mi pri la viro ruzega, kiu tre multe
vagadis, post kiam li estis ruiniginta la sanktan urbon
Troia; de multe da homoj li vidis la urbojn kaj ekkonis la
nacian karakteron, multajn dolorojn li ankaŭ suferis en
sia animo, penante akiri propran vivosavon kaj revenon
de siaj kunuloj. Sed tamen li ne savis siajn kunulojn,
kvankam li arde deziris tion: ĉar ili pereis pro sia propra
senpripenseco, la stultuloj! kiuj formanĝis la bovojn
de Huperion Helios; sed ĉi tiu deprenis de ili pro tio la
hejmalvenan tagon. Rakontu ankaŭ al ni, dieca filino de
Zeus, pri tio, komencante, kie ajn vi volas.

[El la franca traduko de Victor Bérard]

C'est l'Homme aux mille tours, Muse, qu'il faut me dire,
Celui qui tant erra quand, de Troade, il eut pillé la ville
sainte, Celui qui visita les cités de tant d'hommes et
connut leur esprit, Celui qui, sur les mers, passa par tant
d'angoisses, en luttant pour survivre et ramener ses gens.
Hélas! même à ce prix, tout son désir ne put sauver son
équipage : ils ne durent la mort qu'à leur propre sottise,
ces fous qui, du Soleil, avaient mangé les bœufs; c'est lui,
le Fils d'En Haut, qui raya de leur vie la journée du retour.
Viens, fille de Zeus, nous dire, à nous aussi, quelqu'un de
ces exploits.

[El la angla traduko de Emily Wilson]

Tell me about a complicated man.
Muse, tell me how he wandered and was lost
when he had wrecked the holy town of Troy,
and where he went, and who he met, the pain
he suffered on the sea, and how he worked
to save his life and bring his men back home.
He failed, and for their own mistakes, they died.
They ate the Sun God's cattle, and the god
kept them from home. Now goddess, child of Zeus,
tell the old story for our modern times.

[El la angla traduko de Chapman]

The man, O Muse, inform, that many a way
Wound with his wisdom to his wished stay;
That wander'd wondrous far, when he the town
Of sacred Troy had sack'd and shiver'd down;
The cities of a world of nations,
With all their manners, minds, and fashions,
He saw and knew; at sea felt many woes,
Much care sustain'd, to save from overthrows
Himself and friends in their retreat for home;
But so their fates he could not overcome,
Though much he thirsted it. O men unwise,
They perish'd by their own impieties!
That in their hunger's rapine would not shun
The oxen of the lofty-going Sun,
Who therefore from their eyes the day bereft
Of safe return. These acts, in some part left,
Tell us, as others, deified Seed of Jove.



Recenzo

“Kredu min, sinjorino!” - nekredeble leginda friponaĵo

De Stanislavo Belov

La vivo estas ludo, la ludo estas vivo – mi konsideras tiun koncepton trafa kaj ĉiam sekvas ĝin. Tio helpas al mi superi absurdecon de nia ekzistado, kiu aparte videblas por ĉiu, kiu pli-malpli bone konas internajn mekanismojn de la politika, ekonomia kaj kultura vivo.

“Bazarulo” – tiel li nomas sin kaj evidente tio estas plej ĝusta vorto por ĉi metio, kies angla varianto estas “grafter”. Cezaro Rossetti trafe priskribas tiun homspecon (nome tiel, ĉar temas ne pri profesio, sed pri karaktero) en la unuaj paĝoj de sia verko: “Ordinare li estas kombino de ĉarlatano kaj trud-vendisto, kaj lin interesas nur la tuja vendado. Li uzas ĉiujn rimedojn, esceptinte pafilojn, por devigi la interesaton aĉeti”.

Ja bazaruloj estas vera gento, kiu vagadis tra tiutempa Britio, ĉefe de unu foiro al la alia, por vendi ion ajn al iu ajn. Tiuj inventemaj homoj estis ĉefe spertaj psikologoj, kiuj profunde alproprigis diversspecajn vendotrukojn jardekojn antaŭ apero de la popularaj nun kursoj pri vendoarto. Ne gravas kion oni vendas, gravas nur kiel oni faras tion – tiun ideon la aŭtoro ripetas kaj pruvas plurfoje.



La romano legeblas leĝere kaj rapide, unuglute. Fakte tio estas kolekto da sinsekvaj rakontoj pri aventuroj de la aŭtoro, ligitaj al lia profesia vivo. Antaŭ leganto trapasas homoj, urboj kaj okazaĵoj, foje dramecaj, sed plejparte amuzaj. La aŭtoro estis homo animforta kaj ĉiam kredis je sia sukceso, do plonĝis en plej riskoplenajn aventurojn kun ridemo survizaĝe. “Kial timi neon?” estis unu el liaj devizoj. Tio spronis lin fari neimageblajn proponojn kaj... ofte sukcesi.

Mi bedaŭras, ke UEA ne dungis tiun elstaran vendiston de iuj ajn varoj, ĉar tiukaze li sendube vendus Esperanton milionope kaj la fina venko okazus antaŭ mia naskiĝo.

Se la aŭtoro de la legendeca kaj populara esperanto-romano trafus la nuntempan esperanto-medion, ĉu li estus akceptita? Mi dubas. Vaganta vendisto, ĉarlatano (en lastaj ĉapitroj li rakontas pri la organizita de li aŭguristina prezentaĵo kaj klarigas friponajn mekanismojn per kiu tio funkciis), amoremulo pri kiu lia amiko ŝerce diris, ke “li enkondukis haremojn en la Oriento” – evidente li ĝuis Esperanton ne kiel adoranto, sed kiel uzanto, li simple vivis en ĝi same kiel li vivis kaj ĝuis la vivon.

Do li apenaŭ estus akceptata de la nuna esperantistaro, kiuj grandparte dividiĝas je du kategorioj: fanatikaj lingvoskrupuloj kaj senpensemaj lingvoludantoj. Dum la unuaj ŝatas paroli nur pri Esperanto, la aliaj ŝatas babili pri io ajn – kondiĉe ke la paroltemo ne superos la limojn de “saluton – kiel-vi-fartas – jen mia foto – kia bela kato – ĉu vi iros al kongreso – ĝis”.

Do mi tutkore konsilas al legantoj – aĉeti kaj legi – tiun brilan libron, kiu supervivis sian verkinton kaj sendube estos legata kaj ŝatata de pluraj generacioj de esperantistoj.

Ligilo:
https://mybook.to/Kredu_Min_Sinjorino

Slam-poezio ĉiam vivanta!

De Tamara Anna Koziej
Kebekio

La slamo ne estas nur literatura ĝenro. Ĝi estas viva renkontiĝo inter poeto kaj publiko. Ĝi redonas al poezio ĝian originan voĉon: la buŝan prezentadon, la emocion, la ĉeeston. Ĉiu slamo estas unika momento, kie la teksto vere ekvivas nur antaŭ aŭskultantoj.

La moderna poetry slam naskiĝis en Ĉikago meze de la 1980-aj jaroj danke al Marc Kelly Smith, usona poeto... kaj konstrulaboristo! Li rimarkis, ke tradiciaj poeziaj legadoj ofte estis tro akademiaj kaj malproksimaj de la publiko. Lia celo estis simpla: redoni poezion al la homoj, fari ĝin alirebla, vigla kaj partoprena. En 1986 li organizis la unuan regulan *Poetry Slam* en la fama ĵazklubejo Green Mill. La koncepto rapide disvastiĝis tra Usono kaj poste tra la tuta mondo.

La reguloj estas surprize simplaj. La poeto prezentas propran originalan tekston. La prezento daŭras maksimume tri minutojn. Ne estas permesataj muzikaj akompanoj, kostumoj aŭ aliaj rekvizitoj. La ĉefaj iloj estas la voĉo, la korpo kaj la poezio mem. La juĝantoj ne estas fakuloj, sed hazarde elektitaj personoj el la publiko, kiuj donas poentojn. Tiel la publiko fariĝas aktiva parto de la evento, kaj la konkurso restas antaŭ ĉio festo de la parola arto.



Tamen la plej grava frazo de la slama mondo restas la fama diraĵo de Marc Smith:

«La poentoj ne gravas; la poezio gravas.»

La konkurso estas nur ludema kadro por instigi pli atentan aŭskultadon kaj pli intensan sperton. La vera venkinto estas la poezio mem.

En multaj landoj ekzistas naciaj aŭ regionaj slamligoj. Ili organizas lokajn turnirojn, trejnadon por novaj slamistoj kaj naciajn ĉampionecojn. Kutime poetoj unue partoprenas lokajn vesperojn. La plej sukcesaj kvalifikiĝas al regionaj kaj poste al landaj konkursoj. Tiel formiĝas vigla internacia komunumo, en kiu oni samtempe konkuras, kunhavas spertojn kaj reciproke inspiras unu la alian.

Kvankam la slamo naskiĝis kiel konkurso, ĝi fariĝis multe pli ol tio. Ĝi donas voĉon al diversaj generacioj, kulturoj kaj vivspertoj. Sur la scenejo ĉiuj estas bonvenaj: profesiaj poetoj, komencantoj, studentoj, laboristoj, emeritoj... La slamo memorigas al ni, ke poezio ne apartenas al elito, sed al ĉiuj.

Ankaŭ en Esperantujo la slamo trovas naturan hejmon. Nia lingvo ĉiam favoris internacian dialogon, kreemon kaj rektan homan renkontiĝon. La voĉo, la ritmo kaj la universala spirito de Esperanto perfekte harmonias kun la energio de slam-poezio.

En la sekva parto de tiu ĉi artikolo Tamara rakontos pri sia propra vojaĝo en la mondo de slam-poezio: kiel ŝi malkovris ĝin, kial ĝi fascinas ŝin, kaj kiel ĝi fariĝis grava parto de ŝia arta vivo.



Unu lando, multaj komercaj baroj

De Aaron Chapman
Brita Kolumbio



Por kanada entrepreno, kliento kiu troviĝas sude de ni povas esti pli proksima ol kliento en alia provinco. Distancoj kaj transportkostoj jam malfaciligas komercon inter kanadaj regionoj. Indas do demandi, ĉu reguloj kaj administraj postuloj aldonas pliajn kostojn, kiujn eblus eviti sen malfortigi necesajn protektojn.

La interna komerco jam estas grava parto de la kanada ekonomio. Laŭ la registara agentejo Statistiko Kanado, la valoro de la komerco de varoj kaj servoj inter provincoj kaj teritorioj estis ĉirkaŭ 527 miliardoj da kanadaj dolaroj en 2024. Tamen estas multaj malhelpoj, kaj komerci inter provincoj povus esti pli facile. Por malgranda produktanto, malsamaj postuloj pri permesoj, normoj kaj proceduroj povas multekostigi vendadon en alia provinco kaj rezultigi plian administran laboron.

Pensu ekzemple pri botelo da vino. Antaŭ marto 2026, loĝanto de Ontario, kiu deziris vinon el alia provinco, ne povis simple mendi ĝin rekte de la produktanto por hejma livero. Interkonsento inter Ontario kaj Nov-Skotio tiam malfermis tiun eblon por vino el Nov-Skotio, laŭ difinitaj kondiĉoj. En julio 2026, naŭ provincoj subskribis pli vastan interkonsenton pri rekta vendado de alkoholaĵoj al konsumantoj. Tio donas al vinfarejoj novajn eblajn klientojn, kvankam produktantoj ankoraŭ devas ricevi koncernajn rajtigojn kaj la praktika efektivigo varias.

La dua ekzemplo troviĝas sur la aŭtovojo. Kamiono kun aparte granda ŝarĝo povas bezoni malsamajn permesojn aŭ avertajn ŝildojn laŭ la provinco, tra kiu ĝi veturas. Iuj diferencoj reflektas lokajn kondiĉojn, sed la diverseco de postuloj povas kompliki la planadon de vojaĝo. En junio 2026, la koncernaj federaciaj, provincaj kaj teritoriaj ministroj subskribis interkonsenton por pli bone kunordigi la regulojn pri kamiontransporto, interalie pri permesoj kaj avertaj ŝildoj. La celo estas faciligi la transporton de varoj trans provincaj limoj.

La afero fariĝas eĉ pli delikata ĉe manĝaĵoj. La plej proksima buĉejo por brutbredisto povas troviĝi en najbara provinco. Se ĝi funkcias nur sub provinca inspektado, la bredisto normale ne rajtas transporti la viandon reen al sia propra provinco por vendi ĝin. En julio 2026, la kanada agentejo pri inspektado de nutraĵoj proponis limigitan, provizoran escepton por malgrandaj kvantoj da kruda ruĝa viando en regionoj kun nesufiĉaj buĉservoj. La propono inkluzivas postulojn pri inspektado kaj pri la spurebleco de la viando. La defio estas do praktika: faciligi al bredistoj la uzon de proksimaj buĉejoj kaj samtempe protekti konsumantojn.

Unu ebla solvo estas reciproka agnosko: provinco akceptus atestilon aŭ la rezulton de inspektado farita en alia provinco, se la koncernaj normoj donas egalvaloran protekton. Tiel entreprenoj povus eviti ripetajn petojn, kotizojn kaj prokrastojn. Apartaj lokaj kondiĉoj tamen povus pravigi pliajn kontrolojn. La aŭtoritatoj devus klare difini, kiam sufiĉas la jam faritaj kontroloj kaj kiam necesas pliaj por protekti la sanon kaj sekurecon.

Ne ĉiu regulo estas sensenca baro. Sed se entrepreno jam pruvis, ke ĝi plenumas ekvivalentajn normojn, kial postuli la saman pruvon denove? Sukceson oni mezuru per tio, ĉu ordinara kanada produktanto povas vendi en alia provinco sen perdi sin en labirinto de proceduroj. Kiam ni ne povas esti certaj, ke eksterlandaj partneroj respektos siajn interkonsentojn, des pli gravas forigi nenecesajn barojn en nia propra lando.

Trovu ĉiujn fontojn de ĉi tiu artikolo ĉe:

https://mallonge.net/291



Jesper Jacobsen fariĝas la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto

Post la bedaŭrinda forpaso de Probal Dasgupta en junio, la Akademio de Esperanto elektis sian novan prezidanton: la 55-jara dana fizikisto Jesper Jacobsen. Jacobsen, kiu dum multaj jaroj loĝas kaj laboras en Francio, estas konata figuro en la Esperanto-komunumo. Li estas multfoja premiito de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj ano de la Akademio ekde 2019.


Kiel nova gvidanto, Jacobsen havas tre klaran vizion pri la estonteco de la institucio. Laŭ la statutoj, la Akademio devas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon. Jacobsen emfazas, ke ĉar Esperanto fariĝis natura lingvo evoluanta per la uzo de siaj parolantoj, tiujn statutajn taskojn oni devas interpreti en nuntempa kunteksto per tradiciaj kaj modernaj metodoj. La Akademio praktike helpas uzantojn per sia Lingva Konsultejo, formalaj rekomendoj kaj decidoj, krom la publikigo de la Oficialaj Aldonoj. Li opinias, ke la Akademio devas kaj sekvi kaj gvidi la lingvan evoluon, baziĝante sur la zorge studita lingvouzo de bonaj verkistoj, precipe Zamenhof.

Lia plej unua prioritato estas garantii bonan kaj konstruan diskutklimaton ene de la Akademio por subteni la iniciatemon de la membroj. Tio faciligos la prilaboradon de gravaj dokumentoj, kiel la Deklaro pri la litero Ĥ kaj la atendata Dekunua Oficiala Aldono.

Kiel direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, Jacobsen aparte zorgas pri tiu ĉi lasta projekto. Post tri jaroj da intensa laboro kaj pli ol 8 000 forumaj mesaĝoj, la membroj nun voĉdonas pri vortoj komenciĝantaj per la litero O. La teksto jam havas 29 paĝojn, kaj oni esperas prezenti ĝin publike post unu aŭ du jaroj. Tiu ĉi verko sekvos aliajn lastatempajn sukcesojn, kiel la Dekan Oficialan Aldonon kaj gravajn lingvajn deklarojn.

Laste, Jacobsen esprimas profundan optimismon pri Esperanto. Li priskribas la lingvon kiel brilan kaj freŝan juvelon, kiun 139 jaroj da historio nur igis ĝin pli alloga kaj matura, tute preta servadi al la tuta mondo.





El La Arĥivoj - Kim Keeble

[El la numero aŭtuno/vintro 2001 - antaŭ 25 jaroj]

En aŭtuno ĉi-jare honoriĝis Kim Keeble de Upper Rawdon, Nova Skotio per honora membreco de KEA. Ĉi tie ni represas kelkajn komentojn pri ŝia multjara agado de Bob Williamson.

Honorigo de Kim Keeble

De Bob Williamson
Nov-Skotio
Lumo #2 (aŭtuno/vintro) 2001

Ŝajnas ke Kim delonge interesiĝis pri la internacia lingvo kiam ŝi afable helpis min eklerni ĝin. Ekde 1981 ŝi kontrolis la lecionojn de la Koresponda Kurso kaj, ĝis la fino de marto 2001, ŝi korektis 1603 lecionojn kaj disdonis 61 atestilojn – 31 al viroj kaj 30 al virinoj. Antaŭ 17 jaroj mi ricevis la mian. Nuntempe estas ne multe da intereso en tiu kurso, sed ŝi esperas ke la nova brita/kanada kurso pri kiu ŝi laboras instigos plu da intereso pri koresponda kurso.

Kim ankaŭ forte kredas ke oni bezonas pli da reklamado pri Esperanto en la lernejoj – elementaj, submezaj kaj mezaj – por ke pli da homoj sciu pri Esperanto. Tial, dum la pasintaj 9 jaroj ŝi trovis kvar aŭ kvin ŝancojn por volontuli kiel instruistino de Esperanto ĉe distriktaj lernejoj. Ŝi komencis instrui la sesaklasanojn per la Mondo-Rondo instrumetodo "Dek Demandoj" de Charlotte Kohrs. Ŝi instruis al la studentoj iomete de geografio pri la landoj al kiuj ili interŝanĝis bildkartojn, kaj Esperanton laŭ la "Dek Demandoj". Ĉiam Kim serĉas pli efikajn metodojn por instrui, ĉu per novaj videobendoj kiel "Mazi en Gondolando", ĉu per novaj lernolibroj. Ŝi trovis duonhoron nesufiĉe por instrui la geknabojn, do ŝi iniciatis postlernejan Klubon "La Friponetoj" kies kunvenoj daŭris plenan horon. Ŝi gvidis la studentojn en tiu Klubo dum tri jaroj kaj instruis du kursojn dum la someraj ferioj. Ekde la sepa klaso la Friponetoj ĉeestis alian pli foran lernejon, kaj la nova lernejestrino ne havis intereson pri Esperanto. Tial ŝi ne instruis dum tuta jaro, sed lastjare ŝi iris al la pli fora elementa lernejo por instrui la infanĝardenanojn kaj la unuaklasanojn. Estis tro malfacile instrui la du klasojn – la infanĝardenanoj eĉ ne povis legi – do nun ŝi instruas la unuan klason po nur duonhoro semajne, tempodaŭro kiu ne sufiĉas.

Kim ĉiam donis informon pri Esperanto al la lernejestrinoj kaj instruistinoj en la lernejoj kie ŝi instruis, sed ŝi havas la opinion ke ili ne traktas ŝin serioze ĉar ŝi ne estas profesia instruistino. Tamen, antaŭnelonge ŝi lernis ke eksFriponeto nun gvidas grupon ĉe la lernejo en la studo de Esperanto. Inter la grupanoj estas du instruistoj kiuj ambaŭ opinias, ke Esperanto estas inda studobjekto. "Eble," ŝi skribas, "mia semado nun fruktas, precipe se la instruistoj vere interesiĝas."

Pro ŝiaj jardekoj da aktivado kun la poŝta kurso kaj en lokaj lernejoj, ĉiam instruante kaj afable instigante ŝaton pri la lingvo, Kim Keeble sendube meritas la honoron de la KEA.

[Noto: Kim Keeble forpasis en oktobro 2015 je la aĝo de 90 jaroj]

Statutŝanĝoj: solvo aŭ distraĵo?

De Guy Matte
Ontario



Universala Esperanto-Asocio (UEA) starigis laborgrupon por studi proponon pri statutŝanĝoj. La iniciato venis de Esperanto-USA kaj celas redukti la nombron de membroj necesan por akiri plian reprezentanton en la Komitato.

Kompreneble, post la starigo de tiu laborgrupo aperis ankaŭ pluraj aliaj amendproponoj. Ĉiuj, kiuj ne estas kontentaj pri la nuna stato de UEA, vidis en tiu procezo okazon por enmeti siajn proprajn proponojn.

Sed oni devas demandi sin: **ĉu statutŝanĝoj estas vere la problemo, kiun UEA devas solvi nun?**

Ofte organizaĵoj uzas statutŝanĝojn por kaŝi aŭ prokrasti pli profundajn problemojn. En la kazo de UEA, unu el la plej gravaj defioj estas la malkresko de la membraro. UEA gajnas membrojn en landoj kun malpli granda pagipovo, dum ĝi perdas membrojn en landoj, kie la ekonomia kapablo pagi kotizojn estas pli granda. La rezulto estas antaŭvidebla: malpli da financaj rimedoj por plenumi ĉiujn devojn kaj realigi ĉiujn iniciatojn de la Asocio.

Tiu situacio ne estas daŭrigebla.

Statutŝanĝoj postulas enorman kvanton da tempo, energio kaj debato. Necesas starigi laborgrupojn, redakti tekstojn, prezenti kaj diskuti amendojn, kaj fine organizi eksterordinaran voĉdonadon de la membraro. Tuta tiu procezo konsumas valorajn homajn kaj organizajn rimedojn — energion, kiu povus esti pli utile dediĉita al membrara varbado, komunikado, merkatiko, kolektado de financaj rimedoj kaj plibonigo de la servoj al la membroj.

Mi ne estas kontraŭ statutŝanĝoj. Ili povas esti necesaj kaj eĉ urĝaj kiam la ekzistanta jura aŭ administra strukturo fariĝas barilo al la realigo de estonta plano. Se la statuto malebligas modernajn labormetodojn aŭ malhelpas la organizaĵon adaptiĝi al novaj realaĵoj, tiam ĝia ŝanĝo estas tute pravigita.

Sed la demando devas esti: **kion ni volas atingi per tiu ŝanĝo?**

Por ke UEA povu funkcii optimume, la ideala formulo laŭ mi estas simpla: **la strategia plano devas difini la direkton, dum statutŝanĝoj devas servi kiel ilo por liberigi la vojon kiam la malnova strukturo bremsas la progreson**. La statuto ne estu la motoro de la organizaĵo; ĝi estu la kadro, kiu ebligas al ĝi antaŭeniri.


La vera defio de UEA ne estas la nombro de seĝoj en la Komitato. Ĝi estas kiel revigligi la Asocion, altiri novajn membrojn, reteni la ekzistantajn, plibonigi la servojn kaj certigi sufiĉajn financajn rimedojn por ĝia estonteco.

Alie, ni riskas dediĉi grandan parton de nia energio al reorganizado de la ŝipo, dum ni ignoras la akvon, kiu eniras ĝin.

Laŭ mi, la nunaj proponoj ĉe UEA riskas esti nur aldono de seĝoj sur la ferdeko de la Titanic.

Guy Matte estas komitatano-A de Kanado al UEA.

Ĉu vi havas opiniojn pri la proponitaj statutŝanĝoj, aŭ pri la nuna stato de UEA ĝenerale? Sendu viajn komentojn al lumo@esperanto.ca







Venontaj eventoj

2026-2027

26-29
Novembro 2026

7-a Virtuala Kongreso de Esperanto
"Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo"
vk.esperanto.net/2026

21-24
Majo 2027

MeKaRo 2027
Peterboro, ON, Kanado

27-30
Majo 2027

TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto)
Rio-de-Ĵanejro, Brazilo

3-10
Julio 2027

Universala Kongreso de Esperanto
Melburno, Aŭstralio

15-22
Aŭgusto 2027

83-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)
Petzow, Germanio



Stipendioj por 2027

Kiel ĉiujare, Kanada Esperanto-Asocio disponigos al siaj membroj kelkajn stipendiojn, kun suma valoro de 2 000 $, por tiuj, kiuj ŝatus partopreni Esperanto-aranĝojn en 2027 sed ne havas sufiĉe da mono por tion fari. La stipendioj estos uzeblaj interalie por NASK, IJK en Germanio, MEKARO, kaj NOREK. Ni donos prioritaton al junuloj. Bonvolu peti stipendion antaŭ la fino de februaro 2027 ĉe informo@esperanto.ca

esk

Lumo

KEA

